
SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN
# La Espero
1999:2

## Ĉu sur Himalajo en la jaro 2000?



## Ĉu esperanto-hotelo en ĉi tiu urbo?

## LA ESPERO

***Organ för Svenska Esperantoförbundet***

ISSN 0014–0694
Majo 1999 • 87-a jarkolekto
Fondita en 1913

**Redaktion:**
Jan Setréus
Franko Luin (teknisk redaktör)

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**
Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08–34 08 00

**E-post:** espero@esperanto.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi, Tyresö

**Tryck:** HA Reklamtryck AB, Stockholm

**Prenumeration 1999:** 180 kr.
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12–3, Esperantoförbundet.



## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Adress:** Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
**tel. 08–34 08 00**, fax 08–34 08 10

**E-post:** sef@esperanto.se
*www.esperanto.se*

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12–3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 1999:**
Direktansluten medlem 180 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 90 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 270 kr (Inkl. 1 ex. av La Espero. Tilläggsex. kostar 90 kr).

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 – 34 08 00

**Fax:** 08 – 34 08 10

**Postgiro:** 578–5

**Hemsida:** *www.esperanto.se/eldona*

**Telefontid:** Samma som EsperantoCentro Stockholm. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.


**Styrelsens ordförande:** Bertil Nilsson


**Manusstopp den 15/6**
**Manus till La Espero**
**sänds till Jan Setréus**
**Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden**
**(tel./fax 08 - 717 75 67)**
**(e-post jan.setreus@2.sbbs.se)**


*La Espero* estas presata sur recikligita papero.


## NI PREZENTAS

# Franko



La tuto komenciĝis la 6-an de junio 1956. Mia patrino sendis min aĉeti malmultekostan viandon en Koper, en tiama Jugoslavio. En montrofenestro de la loka librovendejo kuŝis lernolibro de esperanto – la ceteron vi povas diveni.

Mi apartenas al la relative malgranda grupo da homoj, por kiuj esperanto estas konstanta akompananto. Mi eĉ kredas, ke mi sonĝas en esperanto, sed mi ne certas pri tio, ĉar mi tre malofte memoras miajn sonĝojn. Ĉiukaze mi parolas ĝin hejme kaj en mia libertempo. Dum periodo mi eĉ havis la plezuron paroli ĝin laboreje.

Ke mi venis al Svedio (en 1961) ankaŭ kulpas esperanto. Mi revis partopreni Universalan Kongreson. Kaj ĉar la UK en 1962 estis okazonta en Kopenhago, mi aranĝis – kun trudita helpo de Bertil Nilsson kaj lia edzino Ulla – ke mi ekloĝis kaj eklaboris en suda Svedio, proksime al Kopenhago. Tiun kongreson mi kompreneble partoprenis, kaj poste multajn pliajn.

Tre rapide mi trovis min organizita esperantisto. Eĉ ne du monatojn post mia alveno al Svedio iuj senpripense elektis min prezidanto de junulara grupo en Malmö. Tie mi konatiĝis kun Ulla – ne tiu de Bertil Nilsson – kun kiu mi daŭre parolas en esperanto.

Poste SEJU kaptis min, kaj SEF, kaj UEA (nur la komitato), kaj Eldona Societo. Nu, ŝajnas, ke mi ne povas teni min for de organiza laboro. Iu devas fari tion, kaj je manko de taŭgaj uloj kaj ulinoj iuj eĉ kontentiĝas je mi.

Mi tre frue komencis esplori la esprimeblecojn de esperanto, per tradukoj kaj propra verkado. Parte kulpas pri tio ankaŭ la bezono, kiun mi havis, plenigi la paĝojn de la revuoj, kiujn mi okaze redaktis (*Kvinpinto, La Praktiko, La Espero*), kelkfoje sola, alifoje kun aliaj.

Dum la lastaj jaroj mi estas plene okupita per interretaj solvoj, kaj por SEF kaj por aliaj. Tio estas daŭre nova mondo, sed ĝi donas al ni esperantistoj efikajn rimedojn informi pri la internacia lingvo. Sed pri tio mi ja regule skribas en *La Espero*.

**Franko Luin**

# Emil



Saluton! Mi nomiĝas Emil Josefson kaj mi petas pri pardono pro mia malbona skriba Esperanto (kaj la malbela bildo), sed mi faras provon. Tiu ĉi persono estis parto de la SEJU-estraro dum la jaroj 1996 kaj 1997; mi ĉefe kunhelpis dum la frua planado kaj laboro de la KEF-aranĝo en 1998.

Mi vivas en la agrabla urbo Örebro, kie mi studas en "Lingva kaj Kultura Programo" en la "nova" universitato. Mi esperas baldaŭ magistran ekzamenon en la lingvoj sveda kaj angla, kaj poste mi povos titoli min "Senlabora ekzamenito".

Dum relative longa tempo mi laboris pri sveda C-eseo, Vortfarado en la lingvo Esperanto, kaj mi povas raporti ke ĝi nun estas preskaŭ finita. Mi planas fari interretan version de tiu eseo. Samtempe mi reeklaboris pri mia granda angla D-eseo kiu temas pri Shakespeare en la infana literaturo. Mi esperas, ke ĝi estos finita iam post la somero. Alia "laboro de amo" por mi estas la universitata burleskaĵo de Örebro, kiu tiun ĉi jaron temas pri La elmigrintoj de Vilhelm Moberg. Mi ankaŭ ŝatas legi anglajn librojn, kaj kolekti malnovajn komputilajn programojn.

# Somera kurso en Lesjöfors

Esperanto-Gården en Lesjöfors kunlabore kun Karlskoga Folkhögskola invitas al internacia somera kurso de Esperanto 13 - 23 junio 1999.

Ĉi-jare Karlskoga Popola Altlernejo lokigos la 14an internacian someran kurson al Esperanto-Gården, kursejo-gastigejo en Lesjöfors, kiu situas 80 km norde de Karlskoga (trajn- kaj aŭtobuskomunikoj tra Kristinehamn). Esperanto-Gården funkcias kiel kursejo kaj migrula hejmo kunlabore kun la Sveda Turista Asocio. Esperanto-Gården nun povas malaltpreze inviti al kursoj, seminarioj, kongresoj, sport- kaj ferisemajnoj kaj aliaj kunvenoj por ekz. studrondasocioj, komunumoj kaj privataj entreprenoj. Esperanto-Gården ankaŭ havas restoracion.

Kiel kutime ni invitas al Esperantokursoj diversnivelaj: komencanta, progresanta kaj konversacia. Ni ankaŭ havos kombinan komencant- kaj metodkurson por instruistoj - se la nombro de aliĝantoj sufiĉos. Viaj infanoj estas bonvenaj al infana kurso, kie oni lernas per desegnado, ludado kaj kantado.

Instruado: ses lecionojn ĉiutage kun svedaj kaj eksterlandaj instruistoj. Ankaŭ en la komenca kurso la parolata lingvo estos en la centro laŭ rekta metodo kaj studmaterialo ellaborita en la Esperanto-fako de Karlskoga Popola Altlernejo.

Dum la vespera kaftrinkado ni informos pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia ideo (ni interpretos por novuloj pri la lingvo), montros lumbildojn aŭ aliaĵojn por simpla distrado. Ni interpretos, se necese. Ni inkluzivos ekskursojn kaj liberaerajn aktivecojn en la programon.

Vi povas elekti diverskostan loĝadon, unu- aŭ du-litajn ĉambrojn, familian ĉambron, aŭ amasloĝadon. Ankaŭ troviĝas unu-litaj ĉambroj, ev. private proksime al la kursejo. Vi ankaŭ povas loĝi en propraj tendo aŭ ruldomo. Ni manĝos kune en la lerneja manĝejo. Belaj ĉirkaŭaĵoj. Promena distanco al vendejoj. Tri km al bela sub-ĉiela banejo.

Bonvenon al belega regiono kaj riĉiga somera kurso kun gaja etoso kaj multe da afablaj homoj el diversaj landoj!

## Kostoj po tago

| | |
|---|---|
| Dulita ĉambro, manĝoj, studoj | 240 SEK |
| Tri/kvar-lita ĉambro, manĝoj, studoj | 210 SEK |
| Unu-lita ĉambro, manĝoj, studoj | 320 SEK |
| Amasloĝejo, propra tendo | 20 SEK |
| Propra ruldomo | 50 SEK |
| Manĝoj | 140 SEK |

## Aliaj kostoj

| | |
|---|---|
| Lit- kaj mantukoj | 60 SEK |
| Ekskursoj k.c. kostoj | 250 SEK |

## Infanoj

Ĝis inkl. 15 jaroj duonpreze

## Aliĝo

Prefere ĝis la unua de junio.
Poŝtĝiro "Esperantogården projekt" 98 90 65 - 8

## Adresoj

**Karlskoga Folkhögskola**
691 24 Karlskoga, Svedio
tel. (+46) - 586 - 646 00
fakso (+46) - 586 - 646 22
retadreso: lars.forsman@fhsk.karlskoga.se

**Esperanto-Gården**
680 96 Lesjöfors, Svedio
tel. (+46) - 590 - 309 09
fakso (+46) - 590 - 303 09

# Esperanto-kursoj en Karlskoga

**Tutsemestra kurso**

Oni studas Esperanton enklase minimume 22 lecionojn semajne. La kursoj estas por veraj komencantoj, kiuj dum intensa kurso atingos altan nivelon sufiĉan por skribi ekzamenon, propedeŭtikan al la Internacia Ekzameno.

En la klaso Esperanto estas uzata kiel laborlingvo kaj grade ankaŭ la interrilata lingvo libertempe fariĝos Esperanto. Krom komunaj ekzercoj enklase la studantoj laboras en la lingva laboratorio kaj per hejmtaskoj. Vi povas kromelekti studfakojn kiel ceramikon, teksadon, bazan komputadon, muzikon, desegnadon k.t.p

## Loĝado

Vi loĝas en modernaj unulitaj ĉambroj kun propra duŝo kaj necesejo. Troviĝas komuna kuirejeto kaj TV-ĉambro. Ĉiuj manĝas kune en la lerneja manĝejo. Vi rajtas uzi la sporthalon, la foto-, komputil- kaj bilardoĉambrojn.

## Tempo

18/8 - 21/12 1999

## Kostoj

Studoj, loĝado, manĝado (sen semajnfinaj manĝoj) ĉ. 14 000 SEK
Nur studado ĉ. 900 SEK
Kostoj por lernolibroj ĉ. 300 SEK



# Letero al studantoj en Karlskoga



Unue mi volas danki al ĉiuj miaj studantoj kaj amikoj pro bonega kunlaboro, intensa kunestado dum studado en nia lernejo, ĉia helpo kaj multaj belaj salutoj kaj poŝtkartoj.

...Mi volas danki al KELI, kiu lastsemestre monapogis nian agadon en la E-fako en Karlskoga. Por multaj el la eksterlandanoj estas ege multekoste partopreni en ekskursoj, aĉeti vortarojn, kuiri semajnfine aŭ nur transvivi en Svedio. Tutkoran dankon por via helpo!

...La ĉino Yu Wang kaj la ugandano Edward Senyoma restos en la lernejo dum la printempa semestro por studi la svedan. Pere de Espe- ranto ili sentas, ke ili povos lerni la svedan rapide same kiel la ĉino Basheng Chen, kiu post 4-monata studado de Esperanto printempe 98 ekstudis la svedan.

La rapida progreso en lingvolernado vekis grandan intereson ĉe esperantistoj kaj ne-esperantistoj. Ekz. ni estis invititaj al la fervojista mondkongreso en Aalborg en Danio kaj al la armilindustrio Bofors, kie trideko da scivolemaj inĝenieroj aŭskultis kaj havis multe da demandoj.

En oktobro venis du klasoj kun instruistoj el Ingesund Popola Altlernejo por ĉeesti nian instruadon kaj informiĝi pri Esperanto. Ili vere surpriziĝis ke la studantoj post nur ses-semajna studado tiel bone povis interpreti prelegon.

Dum la UN-tago la Esperanto-fako estis elektita por paroli pri la pacrolo de Esperanto kaj poste Lotta Johansson el la lerneja Esperanto-grupo kan-tis kaj kantigis la studantaron per Venkos ni en gloro.

Iun tagon ni vizitis la Alfred Nobel-Muzeon kun ĝia laboratorio. Vi bone komprenis la Esperanto-tekston laŭ la video.

Alian tagon ni vizitis la hejmon de Patrino en Vall, la bonkora virino, kiu iniciatis lernejon por georfoj, ian komencon de Karlskoga Popola Altlernejo.

Sara Karlsson, eksstudantino de nia E-fako, montris lumbildojn pri Bona Espero en Brazilo, kie ŝi instruis Esperanton al geknaboj dum ses monatoj kaj Puff Östling parolis pri Esperanto en Ĉinio kaj sia vivo en Esperantujo.

En oktobro kelkaj en la klaso vizitis la kursejon Lesjöfors kaj partoprenis en Esperanto-seminario.

En decembro ni finis per La Internacia Ekzameno de la Lernejo. Kaj tiuj, kiuj faris la ekzamenon ricevis tre bonajn rezultojn. Je la fino de la studsemestro nia rektoro Anders Hellgren bonvenigis la tutan E-grupon sur la podion por disdoni diplomojn kaj danki por la studsemestro kaj poste li intervjuis Lovisa pri ŝia studsemestro kaj pensoj pri lingva demokratio.

Multe da studantoj el la tuta mondo aliĝas al niaj kursoj, sed preskaŭ ĉiuj azianoj kaj afrikanoj malsukcesas ricevi vizon. Mi volas denove klare informi al la svedaj ambasadoj kaj la sveda Invandrarverket, ke ne nur temas pri efika lingvoinstruado sed ankaŭ vere serioza, internacia edukado por kompreno, toleremo kaj paco - edukado, nun konata en ĉiuj kvin kontinentoj.

Svedio povus gajni eĉ pli bonan reputacion, permesante al studantoj el la tuta mondo studi en nia lando.

**Lars Forsman**

---

*daŭrigo de p. 3*

Eksterlandanoj rajtas partopreni parton de longa kurso kaj tiam pagi proporcie al studtempo.

**Adresoj**
Karlskoga Folkhögskola
691 24 Karlskoga
tel. (+46) - 586 - 646 00
fakso (+46) - 586 - 646 22
reto lars.forsman@fhsk.karlskoga.se
La lernejo situas du km sude de la centro de Karlskoga.
Ĝi situas bele apud lago en alloga naturo.

Nia lerneja ekzameno estas propedeŭtika al la Internacia Ekzameno.

Nordiaj studantoj ricevas monapogon ĉe:

Nordens Folkliga Akademi
Box 120 24
402 41 Göteborg
Svedio
tel. (+46) - 31 - 69 56 00
fakso (+46) - 31 - 69 09 50

# Karlskoga - internationellt centrum

*I en artikel i Karlskoga-kuriren ges en kort bakgrund till Lars Forsmans arbete med esperantoundervisningen på folkhögskolan.*

"Lars är språklärare och undervisade från slutet av 60-talet i engelska och tyska på Folkhögskolan...

På ett språkseminarium i mitten av 80-talet behandlades esperanto som ett internationellt hjälpspråk. Lars Forsman var till en början tveksam till esperanto som ett globalt hjälpspråk. Efter att ha läst igenom litteratur i ämnet, tände dock Lars på idén och såg de språkliga möjligheterna, som det konstgjorda språket sas skapa...

Han lyckades påverka ledningen för Karlskoga Folkhögskola och fick klarsignal att starta en kurs. Höstterminen 1988 fanns för första gången esperanto med i Folkhögskolans kursutbud. Kursen som var en termin lång, lockade 14 elever, varav 13 stycken kom från Sverige och en från Frankrike..."

*Nu efter tio år har deltagare från 38 länder lärt sig språket i Karlskoga. Senaste kursen hade deltagare från sju länder. Fotografiet som beledsagar tidningsartikeln visar två av deltagarna utrustade med hörlurar i språklaboratoriet.*

"Lars Forsman, som 1997 blev utsedd till det årets esperantolärare i världen, berättar hela tiden entusiastiskt om sina elever och sitt arbete.

— Engagemanget kräver dock sin man och jag känner nu behov av att vara tjänstledig en termin. Den ledigheten behöver jag verkligen för att avsluta en del liggande projekt och sist men inte minst, för att kunna hämta krafter till nya kurser."

(*Ur Karlskoga-kuriren 10/11 1998*)

# Ny stödförening för SEF

### MEDLEM I RONDO LANGLET


Skriv till Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 11342 Stokholm och begär autogirohandlingarna för Rondo Langlet.

Fyll sedan i blanketten och skicka den tillbaka till samma adress. Via autogiro behöver du sedan inte tänka på dina inbetalningar längre.

Se även: www.esperanto.se/langlet/.

När man bildade Svenska Esperantoförbundet 1906 kunde den svenska esperantorörelsen räkna med femton år av organiserad verksamhet. En viktig roll i denna verksamhet hade **Valdemar Langlet** (1872 - 1960). Det var därför naturligt att man valde honom till ordförande för det nya förbundet.

1906 var Langlet 34 år, men han räknades till veteranerna i esperantorörelsen. Som 19-åring var han med och bildade världens andra esperantoförening, i Uppsala, vars ordförande han var från 1892 till 1899. 1895 grundade han och redigerade, tillsammans med Vladimir Gernet från Odessa, tidskriften *Lingvo Internacia*, den andra tidningen i världen på esperanto, och just då den enda utkommande.



Sina två fruar hittade han i esperantovärlden: 1899 Signe Blomberg från Åbo och 1925 Nina Borovko från Moskva.

Valdemar Langlet reste mycket och gärna. Om sin första resa till Ryssland skrev han i *Lingvo Internacia*. Den andra resan, när han besökte bl.a. Lev Tolstoj i Jasnaja Poljana, beskrev han i en bok (*Till häst genom Ryssland*, Fr. Skoglunds förlag, Stockholm 1898, 423 s.). Fler resor och fler böcker följde och ledde bl.a. till en tjänst på Svenska Turistföreningen.

Han gjorde flera resor till Ungern, ett land som han kom att älska. 1932 blev han fast i landet, tillsammans med sin Nina, och verkade som lektor i svenska vid Budapests universitet. 1945, efter krigets slut, återvände Nina och han till Sverige.

RONDO LANGLET

Under åren 1944 och 1945 var han representant för svenska Röda Korset i Ungern. Genom okonventionella metoder lyckades han rädda livet på tusentals ungerska medborgare som riskerade att hamna i nazistiska koncentrationsläger.

Valdemar Langlet ställde upp för esperantorörelsen både i svåra stunder och när den behövde skicklig ledning. Esperantoförbundet har till hans ära stiftat **Rondo Langlet**, ett särskilt sällskap för den som vill stödja förbundet långsiktigt.

Den som anmäler sig som medlem i **Rondo Langlet** ger sin bank eller till postgirot uppdraget att sätta en summa på SEF:s postgirokonto en gång i månaden. SEF har gjort i ordning en särskild blankett som behöver fyllas i. Förfarandet kallas ***autogiro*** och finns för att underlätta återkommande inbetalningar.

Summan man betalar till SEF är förstås frivillig, från några tior till – ja, nästan vad som helst. Varje krona kommer att användas för att främja esperanto: genom att ge ut *La Espero*, ha en livaktig sajt på internet, delta i mässor och konferenser, lämna information till nyfikna, för att betala hyran för Esperanto-Centro i Stockholm, en nog så viktig pusselbit.

**Valdemar Langlet** gjorde det på sitt sätt för 100 år sedan. Vi för vidare hans entusiasm för esperanto genom att hedra honom och bli medlemmar i sällskapet som bär hans namn.

### DONACOJ

**MEMORE AL CHARLOTT ANDERSSON**, du jarojn post la morto
10.000 kr

**KLUBO MIL**
Ingemar Nordin, Stockholm
1.000 kr

# Skakig ekonomi

SEF har de senaste åren haft svårigheter att få debet och kredit att gå ihop i sin ekonomi. Utgifterna har vida överstigit inkomsterna.

Saken sätts på sin spets i det senaste bokslutet. Visserligen stannar underskottet där på endast 384 kr, men det har skett tack vare så stora fondbidrag, att de återstående fonderade medlen börjar ligga på riskabelt låg nivå.

### Hur länge till?

Frågan är hur länge en organisation med cirka 1 000 betalande medlemmar kan hålla sig med både ett Esperanto-Centro i Stockholm och en kostnadskrävande tidning, *La Espero*. De sammanlagda utgifterna för Esperanto-Centro var i fjol 50 617 kr och för *La Espero* 52 979 kr, alltså sammanlagt 103 596 kr.

Inte ens inkomsterna av medlemsavgifter täcker denna utgift. Skall SEF kunna göra något mer, fordras alltså gåvor.

### Gåvor på 15 000 kr och 10 000 kr

De största gåvo-inkomsterna härrörde från ett bidrag från Ido-fonden på 15 000 kr och en gåva till Charlott Anderssons minne på 10 000 kr. Som maka till SEF-kassören var Charlott som skicklig bokförare till stor hjälp och hon talade ofta om möjligheterna att med bidrag hjälpa upp förbundets ekonomi.

I Klubo Mil fanns ett enda bidrag – från Torsten Lund i Malmö – och glädjande nog har i år redan kommit en annan tusenlapp på detta konto, nämligen från Ingemar Nordin i Stockholm.

SEF är tacksamt för ytterligare gåvor på postgiro 2012-3.

**Börje Andersson**

# När eleverna valde ämne själv

Med ovanstående rubrik presenteras esperanto-undervisningen i Åtorp av Nerikes Allehanda. Det handlar om 15 elever i femte och sjätte klass i Åtorps skola i västligaste Närke som under höstterminen valt att studera esperanto. Det är lärarinnan Ann-Mari Milianowicz som genom sitt eget intresse för esperanto kunnat erbjuda eleverna den möjligheten. Det egna valet innebär att språket inte fått mer än tolv lektioner (Ingressens "Ni legas Esperanton kaj satas la lingvon" får väl tillskrivas tryckfelsnisse), men det har räckt för en introduktion. Man tror därtill att man p.g.a. efterfrågan kommer att anordna en ny kurs under vårterminen.

"När NA är på besök lyser flitens lampa flödigt över de vetgiriga barnen...

– Jag blev verkligen förvånad när så många elever valde att läsa esperanto, konstaterar Milianowicz stolt ...

– Jag valde esperanto för att jag tyckte att det verkade roligt att lära sig ett nytt språk, och jag har lärt mig en hel del, säger Jenny som går i femte klass.

Markus inflikar att han tyckte att esperanto verkade vara ett annorlunda språk som verkade kul att försöka lära sig.

– Det är faktiskt ganska lätt att lära sig, säger han bestämt."

**(*Ur Nerikes Allehanda 9/12 1998*)**

# Norrköpings Esperantoklubb 70 år

Det är nu 70 år sedan Norrköpings Esperantoklubb bildades. För att fira jubileet kommer vi att ordna en resa till Tallinn. Enligt planerna sker avresa på pingstaftonens kväll...

I det här numret av *Kelklinie pri...* hittar du även en avskrift av klubbens första årsmötesprotokoll 1930.

"Protokoll fört vid Norrköpings Esperantoklubbs årsmöte Söndagen den 4 maj 1930 i Tempelriddarordens lokal, Nya Torget.

Närvarande: styrelsen, revisorerna och ett 40-tal medlemmar...

§ 3

Sekreteraren s:ano Ragnar föredrog på Esperanto styrelsens årsberättelse, tolkades av s:ano H. Fredriksson. Av årsberättelsen framgick att klubben innom detta sitt första verksamhetsår haft storartad framgång, mest tack vare lektor Seppiks kurser hösten 1929. Klubben hade under året även arrangerat några offentliga föreläsningar. Speciellt omnämndes ett föredrag av Dr Sinha från Indien som varit mycket vällyckat. Medlemsantalet som vid klubbens bildande utgjorde cirka 20 hade under året ökats till omkring 60. Klubben beslöt att med godkännande lägga rapporterna till handlingarna...

§ 7

Styrelsen föreslog att årsavgiften för nästa år blir 2 kr pr medlem, vilket godkändes av mötet...

§ 10

Till styrelse för nästa år valdes ordf. J. Pihlström övriga medlemmar Agda Cronblad, S. Ragnar, Ivar Hägg och Nils Claesson. Suppl. C.A. Carlsson o K.G. Bohman. Revisorer Adar Virén och Alice Andersson med s:ano John Andersson som suppl.

§ 11

S:oro Pihlström meddelade att styrelsen tillsammans med Linköpingsesperantisterna inbjudit Red Morariu fr. Rumänien att hålla kurser i höst. Därvid kommer även fortsättningskurser att anordnas. Till de närvarande vädjades att göra allt vad de kunde för att få dessa kurser så lyckade som möjligt ...

**(Ur Kelklinie pri... 1999:2)**

# Udda språk på högskolan

På måndag drar studentkåren på högskolan i Eskilstuna igång sin första esperantokurs. Under våren får 15 studenter chansen att lära sig snacka esperanto.

Initiativtagare till och lärare för kursen är Sara Török, högskolestudent som själv blev esperantofrälst när hon var 18 år.

Att Sara Török nu startar en esperantokurs på högskolan är för att hon upplever studenter som nyfikna på att testa nya grejer.

Pigga på att hoppa på något ovanligt, säger hon och uppmanar den som är intresserad att haka på kursen, för fortfarande finns det platser kvar...

– Man kan ha mycket kul med esperanto. Bakom esperantorörelsen döljer sig en hel kultur med tidningar, böcker, egna "siter" på nätet, kurser, träffar runt om i världen, kongresser och annat förklarar hon och menar att esperanto är nyckel till en helt ny värld.

**Marie Hillbom/Folket Eskilstuna**
*(Ur La Veka Bulteno 1/1999)*

# Raporto el Skövde

La 41 membroj en Skövde Esperantoklubb havis varian jaron 1998 – pri tio povis la jarkunveno rakonti. La regulaj mardaj renkont- iĝoj en la propra klubejo havis mult-flankajn programojn. Tre sukcesa estis la semajnfina kurso kombinita kun gruekskurso, aranĝita de Gunnar Olsson, kiu ankaŭ gvidis la laboron por ekspozicio en la urba biblioteko.

Danke al Karl-Gustaf Gustafsson la klubo havas propran "hejmpaĝon" en Internet. Hilgon Frisk tradukis en esperanton komunuman informlibron pri Skövde.

La tuta estraro reelektiĝis: Torsten Hammargren, prez., Kurt kaj Hilgon Frisk, Sten Broman, Carl-Erik Ohlsson kaj Rune Andersson.

Notinda estas ankaŭ la eldoneja laboro de Carl-Erik Ohlsson. Lia "Alfab-et-o" eldonis plurajn libretojn kun noveloj de Sten Johansson.

**Börje Andersson**

# La Nilsona Fonduso

*Lastjare (La Espero 3/98 p. 10) ni informis pri la Esperanto-libroj troveblaj en la urba biblioteko de Gotenburgo. Jen la ĉi-jara informo pri tiu ampleksa stoko de libroj.*

La urba biblioteko de Gotenburgo havas nuntempe 855 librotitolojn en aŭ pri Esperanto, kaj 666 el tiuj apartenas al la Nilsona Fonduso. La Esperanto-libroj troviĝas en la dua etaĝo de la urba biblioteko, sub la biblioteka kodo Fye ("Artefaritaj lingvoj; Esperanto"). Nur kelkajn metrojn de la Esperanto-bretoj troviĝas storejo alirebla por la publiko, kie oni trovas tiujn E-librojn kiuj ne troveblas sur la ordinaraj bretoj.

Parto de la nilsonaĵoj troviĝas en la klubejo; temas pri kajeroj kaj E-libroj de malgranda publika intereso, videokasedoj kaj sonkasedoj. Tiujn oni ankaŭ povas prunti.

Dum 1998 la fonduso aĉetis 22 librojn kaj unu videokasedon...

**Christer Lörnemark**
(*El Inter-ligilo 2:98*)

# Bibliotek och arkiv i Esperanto-Gården

*I styrelseprotokollet för Esperanto-Gården 1998-10-17 kan vi läsa följande:*

§2
***d) Esperantobibliotek och -arkiv.***
Organisation får ställa upp sitt bibliotek, referens- och arkivmaterial i depå i källaren.

Respektive organisation ska själv ansvara för:
- ordning och ev. registrering
- försäkring
- iordningställande av hyllor el dyl

Denna punkt justerades omgående och utdrag ska tillställas intresserade organisationer.

***e) Uthyrning av lagerplats.***
Företag som har esperantomaterial avsett för avsalu erbjuds att lagra detta till en kostnad av 300 kr/kubikmeter/mån.

Denna punkt justerades omgående och utdrag ska tillställas intresserade företag .

# Radio Esperanto mondvasta

Post dek unu jaroj la redakcianoj iom laciĝis, ankaŭ pro la fakto, ke ne estis granda intereso inter la klubanoj en nia agado. La tialo povas esti, ke dimanĉo ne estas konvena tago por aŭskulti. Cetere la neesperanta publiko neniam reagis. Komenci elsendi radioprogramojn pri kaj en Esperanto por interesi homojn estis la ĉefa tialo kaj ankaŭ por informi niajn membrojn. Ni provis dum 11 jaroj.

Kelkaj membroj kaj redakcianoj, kiuj mem ne havas eblecon ĉiam aŭskulti, proponis ne subite ĉesi, sed ekzemple nur fojon monate. Nun montriĝas en kunlaboro kun ABF, ke ni sendas ĉiun duan dimanĉon je la sama tempo kiel antaŭe. Do la ...14-an kaj la 28-an de marto. Pri la venonta periodo ni ankoraŭ ne decidis.

Nun ankaŭ estas la ebleco aŭskulti niajn radioprogramojn per la programo de Real Audio en Interreto. Bedaŭrinde por vi, kiu ne havas komputilon kaj la eblecon aŭskulti per Real Audio.

La radioondaj elsendoj, eĉ satelitaj, havas nur limigitan radiuson por atingi aŭskultantojn, sed la interreto atingas homojn en la tuta mondo. Unu post la alia aperas novaj diverslingvaj "ret-radioj" kaj Esperanto ne estas escepto.

Por aŭskulti la programon de iu radio vi devas ŝalti la programon Real Audio senpage akireblan ĉe la adreso http://www.real.com

Ofte ankaŭ la retpaĝo de la radio entenas ligon al ĝi.

1 Radio Saluton (http://radioesperanto.webjump.com):
Semajne 4-5 minutaj elsendaĵoj precipe ne priesperantaj.
Retadreso esperanto@ciudadfutura.com
2 Radio Verda (http://www.comnet.ca/~chapman/verda.htm):
Laŭtlegitaj anoncoj, rakontoj, artikoloj senditaj de esperantistoj al la kontaktadreso aaron@esperanto.nu
Programŝanĝo semajne (vidu Eventoj-156)
3 Radio Vasteras (http://www.quicknet.se/home/q-111060/radioe.htm):
La redakcio de la "iama" Radio Esperanto invitas vin rigardi kaj "aŭskulti" de tempo al tempo ĝian paĝon.
4 Esperanta Retradio (http://start.at/retradio):
Disponigas elementojn de la elsendoj de Pola Radio (vidu Eventoj-159). Kontaktadreso aldone@hotmail.com
5 Aliajn programojn de Pola Radio oni povas kapti ĉe http://www.ciudadfutura.com/esperanto/eradio
http://www.wrn.org/stations/poland.html
6 La E-programoj de Estona Radio estas aŭskulteblaj ĉe http://www.er.ee/tallinn/espeesti.ram

Por lanĉi E-retradion estas necese havi komputilon, retkonekton, konvertan programon al RA-formato – kaj iom da spaco en retservilo. Volonte ni raportas pri datumoj, adresoj de novaj retradioj.

*(El La Veka Bulteno 1/1999)*

# Komputila ludo en Esperanto

**Billy** estas ekscita ludo, kiu kombinas la bezonojn de rapida reago, taktiko kaj problemsolvado. Komence estas facila, sed post nelonge iĝas nerve malfacila, se oni ne elpensas novajn strategiojn. Ĝi estas la unua profesi-kvalita ludo en Esperanto!

Male al la plejparto de la ludoj de tiu ĉi kvalito, ne estas violentaj scenoj. La amuzaj karakteroj kaj la sen-sanga naturo de la ludo plaĉas al virinoj. Montru al via edzino kaj vi surpriziĝas. Gepatroj povas dormi trankvile dum la nokto – se ili ne mem estas kaptitaj de la ludo.

La ludo kiun ĉiuj amas – knaboj, knabinoj, plenkreskuloj. La du niveloj – facila kaj malfacila, po kun 100 niveloj – donas sufiĉe da taskoj por spertaj ludemuloj, kaj amason da amuziĝo al la resto!

### Sonefektoj de plej alta kvalito ...
- En Esperanto! Billy komentas ĉion...
- Ne-perforta...
- Pli ol 200 niveloj en 5 malsamaj mondoj...
- Amaso da kaŝitaj frandaĵoj...
- Subteno por navigilo...
- Plej detala grafiko...

- "amuza, defia, bonegaj grafikaĵoj, tre altkvalita kompare kun aliaj similspecaj ludoj" *TEJO Tutmonde*
- "tre rimarkinda" *Esperanto en Danio*
- "post du semajnoj da intensa ludado mi povas nur rekomendi ĝin al aliaj (ankaŭ ne-esperantistoj)" *Koncize*

### Minimumaj sistempostuloj
- DOS/Windows aŭ OS/2
- 486DX2/66
- 8 MB da RAMo
- 4xKD-ROM
- 800x600 SVGA grafikkarto

Vizitu la hejmpaĝon de Billy kaj provu la ludon senpage!
http://ttt.esperanto.dk/billy/

Aĉetebla ĉe Esperanto-Centro por 180 kronoj

## KORESPONDU!

Kubano, 21-jara gardisto, deziras eksterlandajn geamikojn krom la kubanoj kiujn li ekkonis per Esperanto. Ne nur studas Esperanton sed ankaŭ estas okupita de sia kariero de juro. Interesiĝas pri nia lando, ĝia historio, kulturo, geografio kaj kiel oni vivas en Svedio. Loĝas en la malnova parto de Havano, tre proksime al la loko kie estis fondita la urbo la 16-an de novembro de 1519.
Angel Castillo
San Ignacio 406, bajo apartamento 4
(10100) La Habana
Kubo

Brazila dommastrino kun du infanoj volas korespondi. Lernas Esperanton. Ŝi volas interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn kaj kalendaretojn. Ŝi ŝatas legadon, pupojn, florojn, katojn, elefantojn k.t.p.
Florenca Bastos Pinheiro
SQN 409 - Bloco F - Ap. 202
70857-060 Brasilia D.F.
Brazilo

# Ĉu eĉ Esperanto-hotelo ĉe Balta Maro?

Edward Kozyra en Pollando skribis al la stokholma klubo informante pri siaj planoj, kiuj koincidas kun la baltmara aktiveco en Svedio. La skribinto de la letero estas best-kuracisto kaj lia edzino Irena, instruistino de la franca, rusa, germana kaj Esperanto. Ili loĝas en Malbork, unu el la kulturaj heredaĵoj de la homaro laŭ UNESKO, sed ankaŭ havas malgrandan loĝejon en la centro de la malnova urbo de Gdansk.

Kun sia edzino kaj alia esperantista familio li volas aĉeti en la centro de Gdansk kvaretaĝan brikdomon. Ĉe la teretaĝo ili intencas fondi restoracion je la nomo de ”Esperanto”. Sur alia etaĝo ili deziras du apartajn loĝejojn por la du familioj. Alia etaĝo estus kelkĉambra Esperanto-hoteleto. Ili havos la monon por tri etaĝoj mem (Post vendo de la alia domo kaj la loĝejo), sed ne sufiĉas por la tuta domo. La Pola Esperanto-Asocio ne havas sufiĉe da mono por aĉeto, oni nur povus lui. Aĉeto de la tuta domo signifus pli favoran prezon, unu etaĝo (60 - 80 kvadratmetrojn) kostas ĉ. 200.000 zlotoj (100.000 germanaj markoj).

Oni pensas, ke la domo estus oportuna por sidejo de baltmara Esperanto-organizaĵo, kaj tial serĉas aĉetonton de unu etaĝo en Svedio. La polaj leĝoj donas al eksterlandanoj kaj eksterlandaj organizaĵoj rajton aĉeti domon aŭ loĝejon en Pollando senprobleme. S-ro Kozyra krome supozas, ke temas pri bona investo ĉar rapide kreskas la prezoj de domoj en Gdansk.

Se iu(j) el niaj legantoj interesiĝas pri la afero, bv. kontakti:

**Edward Kozyra**
**ul. Mazowiecka 23**
**82-200 Malbork**
**Pollando**
**tel. 009-48-55-272 44 86**



*Vidaĵo el malnova Gdansk*

# La Longa Marŝo Verda

Kvin esperantistoj, inter ili ano de ILEI el la urbo Huangshi jam de nun ekpaŝis sian unuan paŝon survoje de la Nova Piedira Marŝado laŭ la nove konstruita transkontinenta fervojo, kiu komenciĝas en la urbo Lianyun'gang, ĉeborde de Pacifika Oceano kaj finiĝos en Roterdamo ĉe Atlantiko, kie troviĝas nuna Verda Mekko - la sidejo de UEA. La Nova Verda Longmarŝo plenumata de ĉinaj esperantistoj havas marŝitineron Ĉinio - Kazakio - Rusio - Belorusio - Polio – Germanio - Nederlando, sume 11 000 kilometroj.

Inspirite de la Kampanjo 2000 de UEA kaj konsciante alfrontantan defion de la Esperanto-movado en la nova jarmilo, la iniciato havas fortan subtenon kaj fakta partopreno de la urba kaj provinca Esperanto-asocioj, ĈEL, kaj fine moralan subtenon de la urba registaro. En la starta urbo Lianyun'gang, la unuan tagon de la novjaro okazis oficiala, tre impona inaŭgura ceremonio pri tiu piedmarŝado.

Espereble aperos informoj de la landskalaj ĵurnaloj kaj novaĵagentejoj dum la progreso de la marŝo. Radio Esperanto raportos.

La aktivado havas la nomon ”Trans-lima Piedmarŝo laŭ la Azia-Eŭropa Fervoja Pont-ligo”. Translimo havas la signifon de spaca translimo - la karavano transiros la geografian limon de Azio kaj Eŭropo (ĉe Ural-montaro) je la horo nulo de la 1-a tago de la jaro 2000, do la jarmila temp-translimo.

La karavana estro (Zhen Xuejun) diris antaŭ la findecido de tiu aktivado, ke li kun siaj kolegoj sufiĉe pripensis ĉiujn flankojn de tiu entrepreno.
Tio signifas, ke ili ne bezonas ajnan mon-helpon de surlokaj personoj aŭ Esperanto-organizaĵoj, kiujn ili vizitos survoje.

Esperanto – Interkomprenemo – Amikeco - Paco estas la celo de tiu marŝado. Survoje ili praktikas la plej simplan vivon. Nuntempe por ili la plej grava problemo estas la enirvizoj por la diversaj landoj. Kvankam kelkaj alilandaj amikoj jam sendis al ili invitilojn, sed eble tiuj ne taŭgas ĉe la limoj.

La partoprenantoj esperas ke tiuj problemoj solviĝos dum la marŝo tra Ĉinio.

*(El La Veka Bulteno 1/1999)*

# Sunkuiriloj en Tanzanio

Lunds Esperantoklubb petis nin helpi ilin en ilia ”Sunenergia projekto konstrui sunkuirilojn en Tanzanio”.

Estas trilanda projekto. Kunlaboras Svedio, Francio kaj Tanzanio.

Por trovi monon ili faris kalendaron por 1999, kiun ili vendas por 50 kr. Estas belaj plurkoloraj bildoj, unu pomonate. La tuta gajno estos transdonita al la projekto.

Bezonatas nur tre simplaj kaj por ni malmultekostaj rimedoj, sed estas tamen komplika, ĉar tio tamen mankas en Tanzanio.

Do, se vi havas 50 kr, kiujn vi ne absolute mem bezonas, aĉetu almanakon. Pagu al pĝ 17 68 40 - 7, Lunds Esperantoklubb.

Se vi volas pli da informoj pri la projekto, skribu al

**Lunds Esperantoklubb**
**Anna-Maria Lange**
**Bredgatan 27**
**222 21 Lund**
**Tel. 046 - 14 73 09**

Se ni helpas unu la alian la rezulto estos bona!

*(El Kungälvs Esperantoklubb Medlemsbrev nr 1 1999)*

# El mia horizonto

Kiam mi, en marto 1996, invitis 30 esperantistojn al Lesjöfors por montri la domon, kiu nun estas Esperanto-Gården, mi havis multajn esperojn. Ĉu ili estis revoj aŭ utopio?

Nun post du malfermitaj kalendaraj jaroj mi skribas ĉi-tiun leteron aŭ informrakonton.

Pensu, unu kursejo por esperantomovado, kiu ankaŭ funkcias kiel informcentro por ne esperantistoj,ne nur por svedaj esperantistoj sed por Skandinavio, eble norda Eŭropo, eble la tuta Eŭropo, eble por esperantistoj el la tuta mondo.

Mi ankaŭ vidis demandojn kaj problemojn, multajn ekonomiajn problemojn, ekz. ĉu estas plej bone aĉeti aŭ lui la domon? Se ni estus luintoj, oni havus kostojn por ĉiu monato, kiujn oni ne havus eblecon influi mem. Se ni estus aĉetinta domon oni havus aliajn eblecojn reguligi la monatkoston se oni ne havas grandan bankprunton.

Post longa, eble ankaŭ malfacila, intertraktado kun la komunuma ĉefkonsilisto, Bengt Nordlöf havis aĉetkontrakton por montri al la estraro por aprobo. Antaŭ la domkontrakto, Carl-Erik Ohlson, post intertraktado kun ŝtatrifuĝejo, aĉetis meblojn al la domo.

La meblojn oni aĉetis en aŭgusto 96 kaj transportis al Lesjöfors dum mallonga tempo. Du firmaoj helpis nin, sen kostoj. Lesjöfors Plastteknik pruntedonis al ni la malnovan fabrikon, kie ni havis eblecon enmagazenigi la meblojn. Qvarnströms, kiu faras vendhelpilojn ekz. rakojn el metalo por gazetoj, bildoj, frandaĵoj k.t.p., pruntis al ni siajn kamionojn, ni nur pagis la benzinon.

La membroj de la estraro faris multajn laborhorojn, sed ankaŭ esperantistaj membroj kaj ankaŭ iuj Lesjöforsanoj ne esperantistoj helpis nin, ekzemple transporti meblojn en Lesjöfors. "Neniu nomita, neniu forgesita".

Malgraŭ ĉi-tiu bona proverbo mi deziras nomi kvar personojn. Harald Anderson, kiu translogiĝis al Lesjöfors kaj faris multan laboron dum la unua jaro antaŭ ol li malsaniĝis. Nun li estas saneta kaj helpas nin kiam li havas fortojn (naskita 1914). Aschim Refai kiu dum mallonga periodo helpis nin antaŭ ol li estis sendita hejmen al Libano. Hans Dahl, kiu ne "havas la dikfingron en la mezo de sia mano". Kaj Karl Elofsson la "ĉef-konstruisto" kaj laboristo. Al Hans kaj Karl mi nur donas ideojn kaj ni diskutas la ideojn kaj ili trovas solvojn pri eventualaj problemoj.

### Bezonas laborhelpon

La laboro por fari la domon bonega ne progresas rapide, ĉar ni bezonas multe pli da helpo.

Kiam ni faras konstrulaboron multe da ŝtonmaterialo flugiras en la domo. Tial ni bezonas multajn purig-laborhorojn dum kaj post la labortempo. Ni bezonas ankaŭ helpon pri konstrulaboro, pentrado, ĝardena laboro k.t.p.

Kio ajn okazos, ni bezonas pli da kapitalo, por aĉeti ekz. ĝardenmaŝino(j)n, laborilojn, materialojn por riparoj k.t.p. k.t.p. Se ni havus pli da mono por aĉeti investobjektojn (materialojn) ni havus eblecon ricevi proksimume 130 000 kr kiel subvencion. Ni nur bezonas investon de proksimume 450 000 kronoj antaŭ septembro ĉi-jare.

Kion ni proponas al vi? Liton (alportu littukojn), kaj eblecon aŭdi la Polan radion sen perturboj. Vi mem faras la manĝaĵojn aŭ ni kune faras la manĝaĵojn laŭ kosto de fabrikado. Bonvolu telefoni al mi Lennart en Esperanto-Gården 0590 – 309 09 kaj rakonti kiam vi venos! Se vi faros specialan laboron bonvolu alporti laborilojn ĉar ni havas nur kelkajn ilojn.

Alia ekonomia problemo estas la kostoj por hejtado, elektra energio, akvo kaj forigo de rubo, asekura kotizo, domimposto kt.p. Mia espero estis, ke ne-esperantistoj venas al nia kursejo kaj pagas la funkciadelspezojn. Esperantistoj donus monon, aŭ aĉetus kooperativajn atestojn, kaj laborhelpon tiel ke ni havos eblecon pagi investojn (ripar-, invest-materialoj, maŝinoj k.t.p.).

### Esperantistoj kaj rali-aŭtistoj

Laŭ vizitstatistiko por 1998, ni havis 1712 gastnoktojn (20 estis infanoj pli junaj ol tri jaroj). Naŭ grupoj, tri estis ne-esperantistoj (72 uloj dormintaj 84 noktojn), ses estis E-grupoj (194 uloj dormintaj 842 noktojn). 912 enskribitaj uloj, ne-esperantistoj, malgranda nombro da gastoj vizitis nin plurfoje, tial mi pensas ke iom pli ol 850 gastoj vizitis nin + 194 esperantistoj eble iuj plurfoje.

En januaro 1998 mi havis 39 gastnoktojn + unu grupon de 30 junuloj sed ankaŭ proksimume 15 gastnoktojn rezervitajn ĝis marto. Poste venis Svenska Rallyt kun 70 gastnoktoj. Poste venis ankaŭ E-grupo de 21 gastnoktoj. Dum la trimonata periodo januaro – marto 98 la tuta sumo estis 279 gastnoktoj.

Ĉi-jare estis 59 gastnoktoj dum januaro. Ni havas 38 gastnoktojn rezervitajn ĝis marto + 133 gastnoktoj dum Svenska Rallyt. Tial, en la momento de skribado estas nur 230 gastnoktoj uzitaj kaj rezervitaj, ĝis la 30-a de marto 1999.

Tial mi havas kuraĝon diri – dum venontaj tempoj Esperanto-Gården estos bona ideo por la esperantomovado kaj por la informado pri nia lingvo...

### Sur la ĉielo estas kelkaj nuboj

Ni bezonas fortigi nian ekonomion tiel ke ni ne malhavu proksimume 130 000 da subvencio.

Ni bezonas laborhelpon por ordigi diversajn ejojn en la domo.

Ni ankaŭ bezonas vian helpon por enmerkatigi Esperanto-Gården kiel kursejon por aliaj organizoj kiuj deziras malmultekostan alternativon por siaj aktivecoj. Eble dum kampada lernejo "lägerskola" la lernantoj faros sportadon dum la tago kaj studos "Esperanton" en la vespero! PRO kaj aliaj kreskulaj organizoj venos por viziti la muzeon de Lesjöfors. La "studfederacioj" havas eblecon fari studrondestrajn kursojn.

Certe vi konas organizojn en via loko/urbo kiuj serĉas lokojn por iuj - bonvolu rakonti pri Esperanto-Gården.

Dankon por via helpo...

**Lennart Svensson**

## NEKROLOGO

### Tore Gustavsson

Mortis en februaro Tore Gustavsson, Skövde. Naskita en 1918 li estis unu el la veteranoj en la klubo de Skövde kaj dum kelkaj jaroj klubprezidanto. Danke al esperanto li havis multajn kontaktojn en la tuta Eŭropo kaj precipe en Pollando.

# La 3-a Internacia Himalaja Renkontiĝo 2000

La Nepala Esperanto-Asocio ĝojas anonci la trian 11-tagan Internacian Renkontiĝon organizitan por konigi sian landon al alilandaj Esperantistoj. Apenaŭ ekzistas iu lando en la mondo kiu povus rangi samnivele kun Nepalo rilate naturan, etnan kaj kulturan diversecon.

Partoprenante la renkontiĝon, vi havos la ŝancon formi vian propran bildon de la lando kaj samtempe konatiĝi kun lokaj kaj alilokaj Esperantistoj kiuj partoprenos la samajn programerojn.

Vi pasigos la unuajn kaj lastajn tagojn de la renkontiĝo en la Katmando-valo, kie situas la ĉefurbo de Nepalo. Ĝian riĉan kulturan pasintecon atestas la tieaj historiaj distriktoj kaj monumentoj, notinde tiuj de la plej grandaj urboj, Katmando, Patano kaj Bhaktapur. Tie vi povos vidi kiel nevaroj kaj tamangoj, la originaj etnoj de la valo, restas fidelaj al siaj jarcentaj tradicioj malgraŭ la multflanka moderniĝo de la valo.

La ĉefa parto de la renkontiĝo estos vojaĝo al alia granda valo de Nepalo, Pokhara, situanta okcidente de Katmando je 200 kilometroj. Survoje vi haltos por fari rajdon flose sur la Triŝuli rivero.

Pokhara, samkiel Katmando, situas en tiel nomata meza regiono de la lando, sude kelkdekajn kilometrojn de la himalaja montaro, kaj de ĝi vi povos ĝui fabelan panoramon de la Dhaŭlagiri, Annapurna kaj Manaslu montoj. La pinto de Machhapuchhre ("la fiŝvosto") majeste dominas la scenon.

De la Pokhara valo vi flugos ĝis Ĝomsom (2.713 m) kaj entreprenos kvartagan rondpiedvojaĝon tra Kagbeni al Muktinath (3.798 m), dum kiu vi havigos al vi, krom eble kelkajn dolorantajn muskolojn, ankaŭ bonan ideon pri la vilaĝa vivo, tiel kiel la plimulto de la popolo ĝin spertas tagtage. Vi ankaŭ ĝuos majestajn vidaĵojn de la himalajaj montoj de Annapurna, Nilgiri kaj Dhaŭlagiri kaj la fonton de fama himalaja rivero, Kaligandaki. La impona templo de Muktinath, estas respektata de kaj budhanoj kaj hinduoj. La regiono ĉirkaŭ Muktinath estas himalaja dezerto kaj tie vi povos observi la vivon de diversaj etnaj popoloj, ekzemple thakalioj, tibetanoj kaj gurungoj.

Dum via restado vi loĝos en bonkvalitaj hoteloj. Ĉiuj manĝokostoj kaj aliaj kostoj en Nepalo estas inkluzivitaj en la aliĝkosto sed ne ampleksas asekuron. La kotizo estis kalkulita por kovri kostojn, ne por gajni monon. Similaj turismaj servoj kutime kostas preskaŭ 150 usonajn dolarojn tage.

## La programo

26/2 Bonvenigo kaj enhoteligo
27/2 Vizito al vidindaĵoj de Pasupati, Bauddha kaj Bhaktapur.
28/2 Vizito al vidindaĵoj de Katmando kaj Patano.
29/2 Duontaga perflosa rajdo kaj poste veturo al Pokhara.
1/3 Flugo al Ĝomsom kaj piedvojaĝo ĝis Kagbeni.
2/3 Piedvojaĝo de Kagbeni al Muktinath.
3/3 Reveno de Muktinath tra Eklebhatti ĝis Ĝomsom.
4/3 Flugo de Ĝomsom ĝis Pokhara kaj vizito de Pokhara.
5/3 Vizito de Pokhara kaj reveturo al Katmando.
6/3 Libera tago, Internacia Vespero, Kongreso.
7/3 Foriro.

## Kotizo

Kotizo en usonaj dolaroj por unu persono

| | |
|---|---|
| ĝis 30/9 1999 | 650 USD |
| 1/10 – 31/12 1999 | 700 USD |
| post 1/1 2000 | 750 USD |

La menciita kotizo validas por dulita ĉambro kaj se vi deziras unulitan ĉambron, bv. aldoni 50 usonajn dolarojn al ĝi. La kotizo inkluzivas manĝadon kaj loĝadon dum la tuta periodo.

Bonvolu sendi la aliĝilon al la 3-a IHR-komitato kun samtempa pago. Kiel dato de la aliĝo validas la alvendato de la plena pago.

## Adreso

Nepala Esperanto-Asocio
P.O. Box 10518 Kathmandu
Nepal
Tel. 009-977-1-410725
(atenton s-ro L.P. Agnihotri)
009-977-1-431431
(atenton s-ro Narendra Bhattarai)

## Bankkonto

Nepal Esperanto Sangh (Renkontiĝo)
550-74775-6
Savings Account
Nepal Bank Limited
New Road
Kathmandu
Nepal

# 16-a Internacia Festivalo

La populara aranĝo por familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj okazos 27 dec. 1999 - 3 jan. 2000 en germana Münster.

Internacia Festivalo prezentas specifan programon por mezaĝuloj ("dua generacio") kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. IF okazas sub profesinivela gvido kaj allogas ĉiujare pli ol 170 personojn. IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, sed laŭdezire ni ofertas paroligajn kursojn, ekz.-e por via partner(in)o. Por infanoj estos aparta prizorgo kaj programo (en du grupoj: por junaj infanoj kaj gejunuloj), sub gvido de fakaj kunlaborantoj, gepatroj povas do senĝene ĉeesti prelegoj. Infanoj laŭeble jam havu lingvajn konojn en Esperanto. Subtrijarul(in)oj estas senkotizaj, sed la gepatroj mem transprenas la prizorgon. Disponeblas infanaj litetoj.

La klerigejo, en la regiono konata kiel moderna kaj komforta seminariejo, troviĝas preskaŭ urbocentre, apud lageto kaj studenta kvartalo, kaj disponas pri prestiĝa duetaĝa enira halo, jen konvena kadro por impone inaŭrigi silvestre la jubilean jaron 2000.

Münster kun preskaŭ 300.000 loĝantoj, la urbo de preĝejoj, kun universitato, burĝaraj kaj aristokrataj domoj, historie famas pro la "vestfalia paco" en 1648, per kiu finiĝis la religiaj kvereloj de la 30-jara milito. La urba domo, en kiu okazis la repaciĝo, i.a. inter Hispanio kaj Nederlando, datiĝas el la 14-a jarcento.

## Kadra temo Eŭropo

Eŭro kaj Eŭropo ankaŭ okupos nin estonte: en 11 landoj la nova valuto jam ebligas monĝirojn - kaj post nur tri jaroj ĝi estos la sola monunuo. Eŭropo unuiĝos pli kaj pli, multaj landoj deziras aliĝi al la "komuna domo", jen invito al diskutoj, informoj kaj prognozoj, sojle al nova jarmilo.

Münster proksimas al la nederlanda limo: celo de nia tuttaga ekskurso (30 dec.) estos la limregiona urbo Enschede. Survoje ni rigardas

akvokastelojn (la regiono "Münsterland" famas pro tio), tagmanĝo en Enschede, promeno/butikumado en "Oude Markt" (bazara placo). La biletprezo inkluzivas la menuon.

Allogos vin interesa kaj ĝuinda vespera programo, kaj la tradicia silvestra balo - kun nia granda Silvestra Bufedo. Nia trinkejo Knajpo jam fariĝis la plej fama en Esperantujo, ĝuu ĝin denove ĉe biero kaj vino, en amika rondo, inter novaj kaj malnovaj geamikoj.

### Kotizoj

La kotizoj en eŭroj rilatas al unu persono kaj inkluzivas programon, loĝigon (duŝo kaj necesejo en ĉiu ĉambro), manĝojn, silvestrajn bufedon kaj balon. La antaŭpago, popersone 45 eŭroj (aŭ egalvaloro), estas parto de la kotizo.

| Aĝo | -30/6 | -30/9 | -30/11 | 1/12- |
|---|---|---|---|---|
| **-2** | 0 | 0 | 0 | 0 |
| **3-5** | 120 | 125 | 130 | 135 |
| **6-13** | 160 | 165 | 170 | 175 |
| **14-24** | 190 | 195 | 200 | 205 |
| **25-** | 255 | 260 | 265 | 270 |

*Fakultative:*

Ekskurso al Enschede en Nederlando kun tagmanĝo

| | |
|---|---|
| infanoj (kun infana menuo) | 15 eŭroj |
| aliaj (kun kompleta menuo) | 25 eŭroj |
| Unulita ĉambro (tuta semajno) | 55 eŭroj |

### Fonduso

Laŭ propono de partoprenintoj ni iniciatis fonduson por subvencii IF-partoprenantojn el nepagipovaj kaj reformaj landoj. Ni anticipe dankas pro via financa subteno.

### Adreso kaj pageblecoj

Hans-Dieter Platz
Postfach 1148
DE-34303 Niedenstein
Germanio
tel./fakso 009-49-5624-8007
aŭ 009-49-171-4964558
interreto http://www.quicknet.se/home/q-111060/intfest.htm

Germana poŝtĝirokonto
91856-676 (BLZ 54510067)
Postbank Ludwigshafen, je nomo H.D.Platz
aŭ
UEA-konto plat-j eŭroĉekoj
en ĉiu ĝiro indiku nomon kaj IF

# BET-35: Baltiaj Esperanto-Tagoj

Latvia Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la 35-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn, kiuj okazos en la latvia havenurbo Liepaja, histoririĉa urbo de Esperanto.

**Adreso**: Vanes strato 4, Liepaja, LV - 3401 Latvio

**Tempo**: 17 - 24-a de julio 1999.
Alveno al la aranĝo la 17-an de julio.
Forveturo la 24-an de julio.

**Aliĝkotizo:** Ĝis la 15-a de majo 20 USD, poste duoble pli.
Infanoj ĝis 15 jaroj aliĝkotizon ne pagas.
Lernantoj, studentoj, handikapuloj pagas 50% de la kotizo.

### Aliĝ-kontaktadreso

Latvia Esperanto-Asocio
p.k. 15 Riga
LV-1050 Latvio
Telefono de la prezidantino Alida Zigmunde 009-371-2-938672
Rete lekanto@adm.aml.lv

### Ekskursa programo post BET

24.7 Vespere al Riga, nokte en hoteleto
25.7 Ekskurso al Sigulda (tuttaga, promeno tra grotoj)
26.7 Ekskurso kaj sunbruniĝo en Jurmala (ĉe golfo de Riga, promeno laŭ marbordo de Majori ĝis Bulduri - 3 horojn)
27.7 Ekskurso tra Riga, muzeoj, vizitado de Opera domo, rigardado de baleto
28.7 Ekskurso al Etnografia muzeo (duontaga)
29.7 Ekveturo al UK en Berlino laŭ itinero; Riga - Monto de krucoj - Ŝauliai - Kaunas, urborigardado, nokto en studenta domo
31.7 Bydgoszcz - Berlino, alveno vespere
Post UK Forveturo posttagmeze tra Poznan

### Prezoj

Buso 160 USD, krome kunportu 20 USD por noktumado survoje
En Riga:
Turisma hoteleto 8 USD popersone potage en 2-3-litaj ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo
Matenmanĝo 4 USD
Vespermanĝo 4 USD
Tage ni manĝos en la urbo
Biletoj por muzeoj kaj baleto oni pagos aparte
Busaj ekskursoj 15 USD potage popersone

# Ĉu vi scias, ke...

- malgranda fabriko de specialaj sportaj aŭtomobiloj "Panozauto" en Usono produktas sportan, elegantan automodelon kun la nomo: ESPERANTE?
  Por detaloj vizitu la retpaĝon: *http://www.panozauto.com/pages/esperante.htm*
- preskau tri milionoj da retpaĝoj kun la vorto "esperanto" estas trovataj per la serĉroboto Altavista: *"AltaVista found about 2,964,790 Web pages for you"*, tio estas "AltaVista trovis proksimume 2 964 790 retpaĝojn por vi"?
- aperis la reta rok-gazet, numero 1999-3 ĉe la adreso: *http://www.sciuro.demon.co.uk/rokgazet?*
  Sen muziko ĉi-monate – espereble nova muzikaĵo haveblos en numero 4.
- ILERA, la Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj, partoprenos en la internacia ekspozicio pri amatora radio kaj komputoroj en Friedrichshafen, lago de Konstanz, inter la 24-a kaj 26-a de junio?


## *La Mirinda Vojaĝo de Nilĉjo Hansson*

de Margareta Hansson

recenzita en *La Espero* 5-6/1998 p.7
Nun aĉetebla je la modera prezo de 75 kronoj.

Pagu rekte al

***Margareta Hansson***
***Ravinvägen 17***
***433 63 Sävedalen***
***Poŝtĝiro 6193988-0***

**B** POSTTIDNING

**B** FÖRENINGS-BREV

Sten Svenonius
Vendelsfridsg 4C
21764 Malmö

POSTEN 99 06 01 SVERIGE




Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

# Polaj E-instruistoj renkontiĝis en Krakovo

La 24-an kaj 25-an de aprilo okazis en Krakovo Esperantologia-Didaktika Konferenco de Pola Sekcio de ILEI. La Konferencon partoprenis pli ol 30 personoj. Ĉeestis ĝin instruistoj de multaj landoj de Pollando kaj studentoj de Scienca Studenta E-Rondo en Krakova Jagielona Universitato. La partoprenantoj solene honoris la 140-an naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto – L. L. Zamenhof kaj 50-jariĝon de ILEI. La inaŭguron de la konferenco faris s-ino Maria Majerczak. La abundan programon de la seminario plenumis multaj interesaj prelegoj:

- Dorota Szczygie, kiu parolis pri Efikeco de la lernado dum kiu estis tuŝitaj koncentriĝo kaj memorkapablo – kun praktikaj atentigoj kaj ekzercoj.

- Maria Majerczak – kadre de metodiko de instruado de Esperanto priparolis diversajn faktorojn favorantajn atingi bonajn sukcesojn en tiu ĉi kampo. Gvidita de ŝi, praktika leciono kun studentoj de Jagielona Universitato vekis grandan interesiĝon de la partoprenintoj.

– Eva Bondar – tre interese prelegis pri la temo: Kiamaniere instrui por sukcesi? Dum la prelego ŝi prezentis uzatajn metodojn kaj montris praktikajn ekzemplojn de sia instruado.

– Jadwiga Gibczynska – dividis siajn spertojn kun la partoprenantoj pri utiligo de aktorado en la lingvoinstruado. Interesa prezento de la temo vekis grandan intereson de aŭskultantoj.


– Lidia Ligeza – parolis pri problemoj de esperantigado de la nuntempa pola poezio. Multaj ekzemploj bone spegulis la ekzistantajn tradukproblemojn.

– Bozena Pietrzyk – interese babilis pri siaj spertoj koncernantaj praktikaj problemoj de E-instruado.

Dum la renkontiĝo elpaŝis la koruso de E-Rondo "Sub la Verda Stelo" en Tychy, gvidata de s-ino Danuta Tudaj el Katowice. La aŭskultantaro honoris la aktorojn per tondraj aplaŭdoj. La promenado tra la urbo kaj vizitado de historiaj lokoj de Krakovo donis al ni ĉiuj neforgeseblajn impresojn. Dankante al ĉiuj organizantoj ni atendos la venontjaran renkontiĝon.

**Antoni Beyga**

## KRUCVORTA ENIGMO



***Horizontale***

1 *Scienco pri la kalkulado*
2 *Libertempoj - Ne plu*
3 *En Irano - Helpo al sendentulo*
4 *Loĝejo por eskimo - 12-monata periodo*
5 *Demandvorto pri personoj - Grup' de oficiroj*
6 *Malmola hist' en korpo - Urbo en Turkio*
7 *Ekzistu - Period'*
8 *Korinklin' - Insekto sub malpura ĉemizo - Du*
9 *Elektran unuon - En koto*
10 *Forta bovo - Emfaza vorto*

***Vertikale***

A *Mondparton*
B *Respondis - Ne kompleta gamb'*
C *Moviĝ' - Pruntotag'*
Ĉ *Modeloj - Monpago*
D *Kutim' - Pejzaĝo*
E *Lokoj - Nenion*
F *Farenda labor' - Frakcio*
G *Neinklinaj*
Ĝ *Parenco -Popoloj*
H *Flava valoraĵo - Estas truo ofte*

**Lennart Persson**

## SOLVO DE 99/1

| | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G | Ĝ | H |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | D | E | M | A | N | D | A | N | T | O |
| 2 | I | S | A | K | | I | L | A | R | E |
| 3 | A | T | R | O | F | I | O | | I | R |
| 4 | M | A | T | R | O | N | | O | P | E |
| 5 | A | S | O | D | R | O | G | | T | |
| 6 | N | | | I | T | | A | V | I | N |
| 7 | T | A | N | G | A | N | J | I | K | O |
| 8 | A | R | E | O | | K | A | R | O | T |
| 9 | J | E | A | N | | U | J | E | J | O |
| 10 | N | O | K | T | O | N | N | N | N | N |

## REBUSO

(Solvo de la rebuso 98/5-6:
**Kolono en Romo estas monolito**)

